

# Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 28-an de majo 2020 per Skype.

(Protokolo aprobata la 20-an de aŭgusto 2020)

## Partoprenis:

Amelie Matt en Tromsø  
Herman Ranæs en Trondheim  
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim  
Mario Machlik en Tromsø

## 0. Tagordo

Aprobata.

## 1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 16-an de aprilo

Aprobata.

## 2. Ekonomio

Ni ne traktis tiun ĉi tagordan punkton pro la foresto de la kasisto.

## 3. Jarraporto 2019

Ni laboris pri la jarraporto kreinte Google-dokumenton, kiun ĉiuj estraranoj povas redakti. Ni faris bonan progreson sed ankoraŭ mankas kelkaj partoj, inter ili pri ekonomio kaj membrostadistiko. Mario kontaktos ankaŭ NJE kaj la estraranojn de la legaco Uhlen por ekhavi la bezonatajn informojn de ili.

## 4. Seminario 2020

Por nia alvoko en Norvega Esperantisto alvenis propono inviti emeritan lingvoprofesoron kies speciala temo estas plurlingveco. Li estas jam iom okupita aŭtune kaj li opiniis, ke ni plie devus havi prelegon en Esperanto. Dume la estraro decidis nenion, sed aliaj eblaj temoj povus esti ekzemple komenci prepari diskuton por la Landa Kongreso 2021, aŭ kunlaboro kun aliaj skandinaviaj, nordiaj E-asocioj. Ni pensas, ke ankaŭ ĉijare la seminario povus okazi fine de oktobro aŭ komence de novembro.

## 5. Asekuro de Esperantonia

Ekde la 25-a de junio ni havas la asekuron por nia oficejo ĉe *Gjensidige*. Ilia oferto ŝajnas esti same favora sed malpli multekosta ol nia antaŭa kontrakto kun *If*. Dume nur Mario havas aliron al la niaj dokumentoj en la retejo de la kompanio, sed ne estas malfacile aranĝi alir-rajton por aliaj. Tamen nun ni ne decidis pri tio.

## 6. Membreco de UN-asocio

NEL estas dum multaj jaroj membro de la norvega UN-asocio. Ĉi-jare la kotizo altiĝis al 500,- kronoj (de 200,-) kaj pro tio ekaperis la demando, ĉu ni pagu tion altigitan kotizon, kvankam nia organizo praktike neniom profitas pro la membreco? La estraro decidis, ke la altigo de la kotizo ne ŝarĝas signife nian ekonomion kaj per nia membreco ni povas esprimi nian apogon al la celoj de UN.

## 7. Cent-jariĝo de Astrid Mansrud

En la nomo de NEL Mario telefone gratulis al Astrid Mansrud, kiu dum multaj jaroj tre aktive laboris por disvastigo de Esperanto en Oslo. Ŝi fartas bone en la maljunulejo kie ŝi nuntempe vivas. Ŝi tre ĝojis pro niaj salutoj kaj preskaŭ la tuta konversacio okazis en flua Esperanto.

## 8. Eventualaĵoj

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris 20:30 - 21:40

La venonta interkonsiliĝo okazos la 20-an de aŭgusto 2020.

Raportis Mario Machlik